Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Aprilo : 1 2022

## PAPO FRANCISKO SENDEVIGAS KARDINALON TENI SEKRETON

Papo Francisko permesis al kardinalo Angelo Becciu atesti en juĝa proceso, ekigita en Italio, kontraŭ Cecilia Marogna. S-ino Marogna, laŭ ŝi mem asertis, estas "konsilantino pri sekureco" de la Ŝtata Sekretariejo de Vatikanurbo. Ŝi estas akuzita pri malversacio pri publikaj monprovizoj, ekzakte temas pri fraŭda alpropigo de mono kavigita okaze de aĉeto de multekosta nemoveblaĵo en Londono, akirita de de la Ŝtata Sekretariejo de Vatikano.

Kardinalo Becciu invokis dum la proceso la "pontifikan sekreton", kiun li, kiel altrangulo de la katolika eklezio devas teni. Ĉi tiel, li ne estus devigita deklari pri siaj negocoj kun S-ino Margona, kiu estas akuzita pri fraŭda alpropigo de 500.000 eŭroj ricevitaj, supozeble, de la Ŝtata Sekretariejo de Vatikano, por pagi ŝiajn laborojn kiel konsilantino pri sekureco sub la ordonoj de Kardinalo Bercciu. Tiu mono estis pagita pere de slovaka entrepreno.



Kardinalo Becciu kaj F-ino Marogna

Tamen, Papo Francisko sendevigis la kardinalon teni tiun sekreton, do, temas pri peto, fare de la Papo, por kunlaboro kun la itala justico. La devo pri "pontifika sekreto" celas protekti delikatajn informojn, kiuj povus endanĝerigi la regadon de la katolika eklezio.

Unuamomente la juraj instancoj de Vatikanurbo pripensis la eblecon peti la ekstradicion de S-ino Marogna, kun la celo juĝi ŝin en tiu malgranda ŝtato, tamen fine, oni decidis rezigni tiun pretendon, pro la fakto, ke simila proceso jam komenciĝis en Italio.

# *Vorto de la Semajno*

**Amnestio:** Ĝenerala nuligo de punoj el difinitaj kategorioj, ofte pri politikaj deliktoj, promulgata en escepta okazo.

**Amnestii** (tr)**:** Nuligi tiamaniere ies punon, forigante eĉ la registritajn atestojn.

**Amnestio Internacia (AI):** Tutmonda homrajta movado kiu agadas por antaŭenigi ĉiujn homajn rajtojn agnoskitajn en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliajn internaciajn normojn. AI havas proksimume tri milionojn da membroj kaj subtenantoj en 162 landoj. En la jaro 1977 ĉi tiu organizo ricevis la Nobel-Pacpremion.

Sinonimoj**:** *forpardoni, antaŭliberigi, liberigi, sendevigi.*

> *Okaze de sia surkroniga festo, la nova reĝo amnestiis ĉiujn kondamnitojn je malpli ol du jaroj da malliberigo.*

AMNESTIO
INTERNACIA

### AVIZO AL ĈIUJ MEMBROJ DE IJEA

Post kelkaj tagoj ni komencos dissendi la numerojn 19an kaj 20an de *Jura Tribuno Internacia*, kiu estos sendata per-poŝte al ĉiuj membroj de la jurista asocio. Do, se Vi lastatempe ŝanĝis vian adreson, bv. sciigi tion al ni, por eviti sensukcesan sendon de ekzempleroj. Dankon!

jurista@esperanto.ac